Post mallonga tempo la kolektite materialo estis tiel multa, ke oni decidis konstrui novan domon nur por la muzeo kaj tiel maniere arigi la tutan materialon en taŭga sidejo. La nova domo en strato D-ro Zamenhof 12 estas 250 kvadratmetra, konsistanta el granda salono - biblioteko, laborĉambro, granda kunvenejo, salono por vizitantoj kaj magazeno por ekspedado de materialoj interesantaĵaj kun aliaj muzeoj kaj bibliotekoj.

Por la muzeo kolektendas ĉio, kio rilatas al Esperanto kaj al ĝia historio kaj evoluo. La biblioteka kolektado estas la plej grava agadsfero. La muzeo havas 2200 jarkolektajn gazetojn, el kiuj pluraj centoj estas jam kompletaj kaj binditaj, aliaj kompletataj. Ĉiuj materialoj estas katalogataj.



Kiel helpi al la muzeo? Ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj kaj allogaj kolektitaj en la muzeo. Forĵetu nenion, kio estas utila por la historia evoluo de Esperanto... Malnovaj leteroj, gazetoj, bultenoj kaj cirkuleroj estas ankaŭ valora materialo. Oni bezonas koni la agadon ne nur de gravaj kluboj... Ankaŭ malgrandaj grupoj kaj izoluloj-esperantistoj per sia agado ofte grave kaj celkonscie helpis kaj kontribuis al la historio de Esperanto. Sendu ĉion nebezona de vi kaj estu certa pri nia dankemo. La adreso: Hispana Esperanto-muzeo en Sant Pau d'Ordal /Barcelona/, Hisp.

INTERNACIA ESPERANTISTA LABOR-BRIGADO ARKEOLOGIA /IELBA/
"DOBRODAN - DEBNEVO 81 - BULGARIO

De la 13-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1981 en Dobrodan kaj Debnevo, distrikto de Lovec, situataj en la montopiedo de montaro Stara Planina, okazos Internacia Esperantista Laborbrigado Arkeologia /IELBA/, dediĉita al la 1300-jariĝo de Bulgara ŝtato. En la brigado partoprenos 120 junaj geesperantistoj de 18 ĝis 30 jaraĝo.

La ununura kondiĉo por partopreno en IELBA estas la sufiĉe bona rego de Esperanto, kiu devas esti konfirmita de la Landa Asocio aŭ de la loka EG.

La laborkondiĉoj estas sufiĉe bonaj. La brigadanoj okupiĝos per malpeza fizika laboro - arkeologiaj priĝoj. La tuta laborperiodo daŭros 22 labortagojn kaj la labortago 7 horojn de la 6,30 - 13,30a horo. Tranoktado, trifoja mangado tage, ekskurso al historiaj vidindaĵoj estos senpagaj kaj la vojaĝkostoj iren kaj revenen por eksterlandanoj de kaj al la bulgara landlimo pagos IELBA je la fino de la brigado. Ĉiuj aprobitaj brigadanoj estos informitaj. Kiuj ne ricevos skribaprobos, ne rajtas partopreni en IELBA.

Estus bone, se muzikemaj partoprenantoj kunportos muzikinstrumentojn.

Korespondadreso: Esperantista Arkeologia Laborbrigado P.K. 29 5500 L o v e c , Bulgario

T e l e v i d o k a j R a d i o

Sabato 14.3. matene la Ĉs. Televido elsendis en rubriko por lernantoj - pioniroj raporton pri kurso de Eli Urbanová por junpioniroj. Al interesigantoj pri Esperanto donita adreso de Klubo de Internacia Amikeco.

Samtage vespere Radio Polonia, en sia Esperanto-elsendo, raportis pri literaturaj kunsidoj de la Literatur-arta sekcio de CEA, precipe pri la kunsido dediĉita al Eli Urbanová. En la programo de la sekvinta kunsido estis "La poeto Jiří Kořínek /24.3./

/jm/

T r a l a m o n d o

Australio. Nova muzeo pri Esperanto kunigos ĉiujn dokumentojn ekde la jaro 1906 rilate la movadon en Kvinlando.

Aŭstrio. Asekur-kompanio /Bundesländer-Versicherung/ ebligis, dank' al granda subvencio, la aperigon de germana - esperanta vortareto.

Belgio. Dum la omaĝo-kunveno de Belga Esperanto-Federacio en Liège /25.10.1980/ al la nova prezidanto de UEA, s-ino Elfriede Ernst el Bruselo transdonis al G. Maertens ĉekon pri 500.000 bfr. por UEA. - La valora gazeto "Dernière Heure" aperigas regule monatan rubrikon pri Esperanto.

Busto de Zamenhof. Dum la unua sud-brazila Esp.renkontiĝo en Porto Alegre, fine de septembro 1980, oni inauguris buston de D-ro L.L. Zamenhof ĉe la universitato de la havenurbo Rio Grande.

Bulgario. Ĉe la sociaj organizoj kaj administraj oficejoj en Ru-se estas fondita E.-societo "Kulturo". Ĝi havas 20 membrojn.

Ĉinio. Ĉ. 1000 personoj vizitis la unuajn tri kursojn organizitajn de la Huangshi-a Esperanto-Asocio. - Fondiĝis la Hunan-a Esp.-Asocio en Changsha, ĉefurbo de la provinco Hunan.

Danlando. La urba biblioteko en Arhus nun havas pli ol 1700 librojn en Esperanto.

Finnlando. Adreso de la nova sidejo de Esperanto-Asocio de Finnlando: Pengerkatu 18 A 86, Helsinki.

Franclando. En trideko da francaj departementoj la profesiaj partoj de la oficialaj telefon-libroj enhavas rubrikon pri Esperanto-instruistoj.

Hispanio. En septembro 1980 fondiĝis Kataluna Esperanto-Asocio. Prezidanto fariĝis Manuel Casanoves kaj sekretario Joan Ramon Guinón. Provizora adreso estas tiu de la sekretario: Frenerai, 1, Barcelona-2.

Novaj oficejoj de UEA. Krom la tri jam funkciaj oficejoj de UEA /Rotterdam, Antwerpen, New York/, la kvara estis efektivi-gata en Budapeŝt.

Nederlando. La nederlandlingva Esperanto-lernolibro de Zonder-van kaj Mendens aperis en grandlitera eldono /133 p./ por uzantoj, kies vidkapablo estas malforta.

Sovetunio. Fondiĝis E.-klubo en la havenurbo Vladivostok. - La 6.-7. de dec.1980 en urbo Ĥarkov okazis la unua respublika seminario de ukrainiaj E.-tradukistoj. Ĉ. 50 partoprenantoj. - Novfondita E.-societo "Flameto" en urbo Ternopol. - Nova Esp. klubo fondita ankaŭ en urbo Kirov. Laboro komencita per instruado de Esperanto al pli ol 200 gekursanoj, kiu vizitas pl rajn kursojn. Adreso: S-ano Martjanov S.A., ul.K.Marxa 77-47 KIROV, Esp.klubo.SSSR.

Lingvosciencia Instituto de la Scienca Akademio de Sovetunio akceptis du doktorigajn tezojn pri la interlingvistiko. La kandidatoj: Dina Lukjaned kaj Boris Kolker. -

En Krasnodar Esperanto estas akceptita kiel oficiala studobjekto ĉe la ŝtata universitato, fakultato pri sociaj profesioj. Adreso: Esperanto, p.k.18, SU-350000 Krasnodar. - ĉe la Pjati-gorska instituto de fremdaj lingvoj, A.S. Melnikov, UEA - del. en Rostov-Don, plej sukcese prezentis sian diploman laboron pri pedagogio. La temo estis La kluboj de internacia amikeco kaj la praktika agado de Rostova E. - klubo.

Svedlando. Nova adreso de Sveda Esperanto-Federacio: Brunmsgatan 21, S - 111 38 Stockholm.

Usono. En Chicago oni povas lerni la I.L.-on per telefona kurso. Ĉiu leciono daŭras 15 minutojn kun legaĵoj, demandoj kaj respondoj pri gramatiko. La kurso funkcias 24 horojn seninterrompe. Ĝi estas aranĝita de aŭdvida laboratorio de Universitato de Il-linois.

Venezuelo. La 30.9.1980 Venezuela Esperanto-Asocio inaŭguris per malgranda festo sian novan sidejon en la komerca centro de Caracas, proksime al la Centra Universitato.

E s p e r a n t a j a r a n ĝ o j

Kongreso de Pola Esperanto-Asocio de 3. - 5.4.1981 Katowice.

Ĉebalta Esperanto-printempo de 23. - 29.5.1981 en Mielno. Sekvos ĝin Internacia Folkloro Renkontigo en Toruń /29.5. - 2.6./ kaj samloke de 2. - 7.6. tradicia aranĝo en la kadro de la "Tagoj de Bydgoszcz". Adr.: Esperantotur, M.Sklodowskiej-Curie 10 , PL - 85-094 Bydgoszcz.

Jubilea Kongreso de Sveda Esp.Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö de 5. - 8.6.1981 en Malmö.

37.Kongreso de Unuiĝo Franca por Esperanto de 6.-9.6.1981 en Perpignan.

Norvega Esperanto-Kongreso de 7. - 9.6.1981 en Nor Turisthotell en Oppdal en Suda Trøndelag. Aranĝanto:la Grupo Esperantista en Trondheim.

Somera Esperanto-Lernejo de 3. - 12.7.1981 en urbo Kotor Va-roš, Jugoslavio. Adr.:E.-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, V. Pa-lagica 8/1, YU-7100 Sarajevo, Jugoslavio.

Somera Esperanto-Universitato de 5. - 11.7.1981 en Gyula, Sud-orienta Hungario. Inf.: Somera Esperanto-Universitato TIT, Gyula, 48-as u.11, H-5700 Hungario

5. sesio de Someraj Universitataj Kursoj de 5. - 19.7.1981 en la universitato de Liege. Temoj: Ekologio kaj pedagogio. Inf.: SUK, BP 9, B-Liège X, Belgio.

Internacia Esperantista Feriosemaĵo de 11. - 18.7.1981 en la naturamika domo en Bavaraĵ Alpoj, proksime de Immenstadt. Plena kotizo 275 gmk. Inf.:Bavara Esperanto-Ligo, Seitzstr.14, D-8900 Augsburg, F.R.Germanio.

ILEI-Konferenco de 11. - 21.7.1981 en Gödöllő, Hungario. Aliĝojn akceptas Instrua Komisiono de HEA, H-1368 Budapest, Pf.193

3.Internacia Medicina E.-Konferenco de 15. - 19.7.1981 en Ruse, Bulgario. Informas la sekretario de UMEA, D-ro I.Ferency, Pf. 143, H-9002 Győr, Hungario.

Hispane Kongreso de Esperanto 17. - 22.7.1981, Murcia. En la kadro de la kongreso okazos la inaŭguro de la strato "Esperanto". Inf.: Org.kom., Apartado de Correos 3.074 Murcia.

Internacia Kultura Semajno de 18. - 24.7.1981 en Stykkishólmur, okcidenta Islando. Prospektoj kaj aliĝiloj ĉe Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Reykjavik, Islando.

Ekumena Kongreso de IKUE kaj KELI de 25.7. - 1.8.1981 en la konferencejo "De Bron" apud Zwolle en Nederlando. Prez. de la kongreskomitato: W. Krikke, Postbus 104, NL-2240 AC Wassenaar, Nederlando.

54. Kongreso de S.A.T. l. - 8.8.1981 en Basel, Svislando. Inf.: SAT, 67 av. Gambetta, F-75020 Paris.

Seminario kaj ferisemajno de 17. - 29.9.1981 en Velingrad, Bulgario. Inf.: Esp.societo, P.K.7, BG-4600 Velingrad.

18. Kultura semajnfino de 25. - 27.9.1981 en Junkerwald, Blieskastel-Niederwürzbach, F.R.G.

KONFERENCO kaj SEMINARIO "APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO-TEĤNIKO

A E S T 8 1

okazos en Žilina /ĈSSR/ la 14.-17.8.1981 kun jenaj tri ĉeftemoj:

1. Tendencoj kaj taskoj en la scienca aplikado de Esperanto,
2. Terminologio,
3. Natursciencaj kaj teĥnikaj temoj /komputeiko, matematiko, elektroniko, elektroteĥniko, masinfako, ĥemio, ekologio, konstruado, akvomastrumado k.a.

Informas kaj aliĝojn akceptas: Ladislav H a n z e l, Hliny 406A,
010 01 Ž I L I N A, Ĉeĥoslovakio

literaturaj vesperoj

Sukcesplena vespero de Eli U r b a n o v á

La literatura sekcio de ĈEA okazigis lunde la 23-an de februaro 1981 en saloneto de kafejo Valdek en Prago vesperon dediĉitan al poezia kreado de s-ano Eli Urbanová, nia konata Esperanto-poetino kaj aktivulino.

La multnombraj ĉeestantoj audis unue fakan prelegon de poeto kaj literaturhistoriisto Josef Rumler pri la verkaro de Eli Urbanová, poste ili guis la versojn de la poetino en unika interpreto de drama artistino Eva Seemannová. La emociplenan vesperon finis vigla diskuto de la ĉeestantoj kun la poetino, kiu tre kompleze kaj afable parolis pri sia verkaro, pri siaj rilatoj kun Julio Baghy kaj aliaj poetoj kaj respondis multajn demandojn.

La poezia vespero de Eli Urbanová estis plua en la vico de arangoj de la literatura sekcio.

En la programo de la "Antaŭvespero de Jiří Kořínek" de nia literatura sekcio la poeto Jiří Rumler parolis pri la vivo kaj verko de Kořínek kaj Eva Seemannová deklamis el liaj verkoj. Sekvis diskuto kun la poeto, kiu venis el Ústí n.L. kun sia edzino. Ĝi okazis la 24.3.1981.

jm

En berlina klubo kun granda sukceso efektiviĝis en marto 1981 la programo dediĉita al verko de Jiří Karen. Supozeble ne longe daŭros kaj la kontrakto pri amikeca kunlaboro inter la kluboj de ambau ĉefurboj /Berlin-Praha/ estiĝos fakto. Tiucele vizitis Praha-n la 3.2.1981 kaj traktis kun respondecaj reprezentantoj de EKP la vicprezidantino de la Klubo Berlin s-ino Monika LUDEWIG.

KRONIKO



Unua ciklo de seminarioj de junulara komisiono de CEA jam finis. Ĝi okazis en tagoj 27. 2. - 1.3.1981 en Valtice. Ĝin partoprenis 19 gejunuloj kaj 4 lektoroj. La frekventintoj laboros en lokaj grupoj.

La 2-an de aprilo atingis meritplena s-ano Alois ŠERCL, longjara membro de EK en Praha sian 88an jaraĝon. Li multe laboris por la biblioteko per bindado de esper-libroj dum longaj jaroj. Pro la sindona laboro kaj lia daŭra oferemo ni varme dankas kaj deziras al li fortan sanon en plujaj jaroj. EKP

La 20-an de decembro 1980 edziĝis Jan Kantner al Alenka Jeníčková - geanoj de plzena LG. Fortan amon, ambaŭflankan komprenon elkore deziras samgrupanoj. M.T.

La 7-en de marto iĝis kvindekjarulo elstara membro de EG "Amikeco" en Česká Třebo-

vá Jiří PIŠTORA. Li staris ĉe la fondo de la rondeto kaj plejparton de siaj fortoj li dediĉis al disvastigado de E. La anaro de LG "Amikeco" deziras al li plenan sanon, feliĝon en la familia vivo kaj daŭrajn sukcesojn. EJ

La 15-an de dec.1980 forpasis longjara sekretariino de EG en Polička prof. Marie ZÁHOURKOVÁ en sia 72a vivjaro. La 1-an de januaro 1980 mortis en la ago de 82 jaroj offerema s-ano Emil DUDEK el Pustá Rybná, ankaŭ membro de EG en Polička.

La 13-an de febr.1981 forlasis nin por ĉiam ankaŭ prezidanto de EG en Tábor instruisto de Esp.kaj pentristo František KNOTEK.

Honoron al ilia memoro!

Nia kara unua vicprezidanto ing. Vlastimil KOCVARA el Opava jam estas 45jaraĝa! Jes, kiel la vivo rapidas. Tamen, li estas en la plej konvena aĝo. Do, sanon, kontentecon kaj sukcesojn /kaj ankaŭ iom pli da tempo por nia Asocio/ deziras la redakcio.

La 23.6.1981 atingas 70jaraĝon longjara oferema funkciulo kaj nun honora prezidanto de EK en Olomouc s-ano Vlastimil Blažek. Post la liberigo de nia respubliko li multe meritigis kiel regiona peranto de tiama EACSR pri rapida reviviĝo de la Esperanto-movado en regiono de Olomouc.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Malfreŝajn numerojn de ESPE-
RANTISTA VEGETARANO, precipe
1 - 15 kaj 19 - 21, insiste
serĉas Jaroslav Lišý,
602 00 Brno, Neumannova 48.

Tutmonde pri ĉiuj temoj dezi-
ras korespondi:
Donka PETROVA, flegistina
9850 PRESLAV, str. Canko Cerkov-
ski 43 Bulg.

D-ro Georgi POPOV, 9850 PRESLAV
str. Stamboliiski 54 Bulg.

Rentgena laborantino Jordanke
Todorova Hlineva, 9350 PRESLAV
str. Ljuben Karavelov 16 Bulg.

Neŭrologo D-ro Dimitar Kostadi-
nov Slavov, 9850 PRESLAV, str.
Boris Spirov 27 Bulg.

Flegistino Slavka Petrova Ate-
nasova, 9850 PRESLAV, Boris Spi-
rov 63 vhod F ap. 10 Bulg.

Flegisto Ĥristo Marinov Ĥristov
9850 PRESLAV, str. Pajisij 11 Bulg.

Flegistino Donka Angelova Poli-
hronova 9850 PRESLAV, str. Kiril
a Metodii 25 Bulg.

Kuracistino-akuŝistino Eli Sto-
janova Salabaŝeva, 9850 PRESLAV,
str. Javorov 10 Bulg.

Dentteknikistino Iviana Dimitro-
va Georgieva, 9850 PRESLAV, str.
Sergej Rumyancev 26, Bulg.

Flegistino Milka Ilieva Vâlĉeva
9850 PRESLAV, str. Vasil Levski
20 Bulg.

Dentkuracistino D-rino Julia
Dobрева Dobрева, 9850 PRASLAV,
Boris Spirov 20, Bulg.

Infankuracistino D-rino Katja
Kraŝteva Kostadinova, 9850 PRE-
SLAV, str. N. Rilski 13, ap. 35 BG.

Flegistino Rusanka Jordanova
Jordanova, 9850 PRESLAV, str. Pai-
sij 13 Bulg.

Infankuracistino D-rino Grosdan-
ka Nikolova Grigorova, 9850 PRE-
SLAV, str. L. Burgas 8 '6' Bulg.

Studento 21-jara-sporto, muziko,
fotografado, pedagogio: Valentin
Karaivenov, 1111 SOFIA - 11,
str. Geo. Milev 25 ap. 7, Bulg.

60-jara elektroteknikisto-ekslī-
brisoj, korespondado: BEBESI Ká-
roly, 7625 PÉCS, Ignác u. 2, Hung.

24-jara studento-kor. pri ĉiuj te-
moj, bildkarto, memoraĵoj: Antonio
Trujillo, Apartado Aéreo 47646
BOGOTÁ 1 - Kolombio

Kiu vizitos Nepalon, nepre kontak-
tigu kun s-ano Gambhir Man Shres-
tha, 11/682 Tanwachhy Tove
KATHMANDU, Nepalo

20-jara studentino, muziko, kino,
teatro, poŝtm., bildk., diapoziti-
voj, gramofondiskoj: Virginia
Machnik, 30-201 KRAKÓW, str. E-
maus 15/14 Pollando

18-30-jaraj gejunuloj kun tuta mon-
do pri ĉiuj temoj: Turisma E-klubo
PTTK-Oddzial' Rataje Os Jagiellon-
skie 12 PL-61-217 POZNAŃ, Pollando.

ANKAŬ MI
ESTAS ESPERANTISTO!



O rozlišování přívlastku a doplňku

)Lingva angulo(

Plena Gramatiko pojednává o tomto tématu v paragrafech 297 až 303. Proto, že se často chybuje při použití předmětového přímého doplňku/rekta objektu predikativo, též rekta atribua predikativo/, všimněme si blíže jeho odlišnosti od prostého přívlastku. Víme, že přívlastek je pádově shodný s podstatným jménem: Mi trovis la bonan vinon. Našel jsem to dobré víno. Doplněk/přisuzující/, atribua predikativo, je neshodný a je vždy v nominativu: Mi trovis la vinon bona. Shledal jsem to víno dobrým. Predikativo atribua /předmětový doplněk přisuzující/ slouží k vyjádření přechodné, pro zmíněný okamžik zdůrazňované a vyjadřovatelem osobně pocitované vlastnosti, stavu, činnosti. Cíli přisuzujeme tyto předmětu nebo osobě. To se může stát 1/ podstatným jménem: Mi konsideras lin bonulo. Ni elektis lin prezidanto, nebo 2/ infinitivem slovesa: Mi vidis la knabon ludi, Li vidis la knabinojn banigi, nebo 3/ přídavným jménem: Mi trovas la vinon bona, Mi vidis la knabinojn banigantaj. Důležité je, že tento doplněk/rekta atribua predikativo/ je vždy v 1.pádu: bonulo, prezidanto, bona, banigantaj. Kdežto pouhý přívlastek, který vyjadřuje trvalou, námi nez důrazňovanou vlastnost je s větným předmětem/věcí nebo osobou/ pádově shodný. Rozlišujeme tedy: Mi vidis la banigantajn knabinojn / nebo i la knabinojn banigantajn/ Viděl jsem koupající se dívky, od Mi vidis la knabinojn banigantaj - Viděl jsem dívky any se koupaly/ jak se koupaly, právě se koupající/, Zde je zdůrazněn moment koupání.

Přisuzujeme /oni atribuas/ 1/ myšlenkou, např. slovesy: kredi, juĝi, opiniĝi, taksi, konsideri, ekkoni, trovi, ŝati, scii, memori ap.: Ĉu vi sentas vin sana? Mi sentis min fremdulo. Oni opiniis lin bravulo. Ŝi rigardis tion grava. Oni ne konis lin tia. Mi trovas la vinon bona.

Přisuzujeme 2/ řečí, např. slovesy: nomi, deklari, aserti, trovi, konfesi, insulti, atesti, proklami ap.: Ne nomu min amiko. Mi konfesas tiun planon malĝusta. Mi atestas tion vera. Ŝi insultis lin stultulo.

Přisuzujeme 3/ činy, např. slovesy: elekti, krei, igi, fari, lasi, kroni, prezenti, pentri, skulpti ap.: La amo faris lin kruela. La konscienco faris nin timuloj. Ŝi lasis la pordon malfermita. Ni havu la manojn puraj! Li pentris lin dikulo. La vino igis lin dormema.

Pamatujme si, že předmětový doplněk/objektu predikativo/ nikdy nemůže mít adverbiální koncovku -e ! Např.: Li pentris la sinjorinon sidanta - Maloval paní sedící /zdůrazněno, že sedí/. Li pentris la sinjorinon sidanta. Maloval sedě tu paní /malíř seděl/. Adverbiální participium /přechodník/ se vždy vztahuje k podmětu věty /zde li - on, malíř/.

Uvádí-li doplněk infinitiv nebo celou podřazenou větu, nemůže mít adverbialní koncovku -e, poněvadž by vznikala záměna s pravou úlohou příslovce: Li opiniis ebla, ke nenu venos - Měl za možné, že nikdo nepříjde. Li opiniis ebla, ke nenu venos - Možná /snad/ se domníval, že nikdo nepříjde.

Ještě příklad na funkci doplnku:

Li erare pentris la virinon nigrokula /doplněk: Omylem namaloval ženu co černookou, zdůrazněno, že omylem jako černookou/.

Li erare pentris la virinon nigrokulan - Omylem namaloval černookou ženu /místo jiné ženy/. Zde jde o přívlastek.


V pochybných případech, kde si nejsme jisti, zda jde o pouhý přívlastek /epiteto/, který je pádově shodný a má u přímého předmětu akuzativní koncovku, nebo přisuzující přímý doplněk /rekta predikativo atribua/, pomůže nám použití členu "la" nebo ukaz. zájmena "tiu". Lze říci: Mi vidas la knabojn ludantaj, nebo Mi vidas ludantaj tiujn /la/ knabojn, jde o doplněk. Nelze však říci Mi vidas la /tiujn/ ludantaj knabojn. Takto umístěn může být jen přívlastek: Mi vidas la /tiujn/ ludantaj knabojn.

Další pomůcka je rozložit větu do souvětí. Začíná-li podřazená věta KE /ka -as, ke -u/, jde o doplněk /predikativo/: Mi trovis la vinon bona - Mi trovis, ke la vino estas bona. Mi konsideras lin honesta - Mi konsideras, ke li estas honesta. Li konsentis tiujn kondiĉojn akcepteblaj - Li konsentis, ke tiuj kondiĉoj estas akcepteblaj. Nutno-li, při rozložení věty do 2 souvětí, uvést druhou větu vztahným KIU /který/, jde o shodný přívlastek: Mi trovis la bonan vinon, ...la vinon bonan - Mi trovis la vinon, kiu estas bona.

Doplněk nepřímý bývá uveden slůvkem KIEL, které zde nemá význam adverbialní a komparativní, ale funguje jako spojka podřezující. Vztahuje-li se k přímému předmětu, je vždy v akuzativu, vztahuje-li se k podmětu věty, je v nominativu: Mi konsideras la temon kiel gravan. Mám téma za důležité. Mi petas vin kiel prezidanton - prosím vás jako předsedu. Mi petas vin kiel prezidanto - prosím vás jako předseda. Mi elektis lin kiel prezidanton /nebo mi elektis lin prezidanto/ - Zvolil jsem jej jako předsedu /za předsedu/. Mi elektis lin kiel prezidanto - Zvolil jsem jej jako předseda /předseda jsem já, podmět věty/. Uvedené věty nesmíme zaměňovat s funkcí KIEL v pravých podřazených větách komparativních /přirovnávajících/: Si donis al la bedo formon rondan, kiel la suno. Li havis okulojn nigrajn kiel karbo.

Jiří Kořínek

Horizontale: **A.** Nomo de Zola /R/; tre varman; pugna sporto; internacia kontrakto /R/. - **B.** La unua parto de eldiro pri motoristoj. - **C.** Nordeuropano /R/; harero de safo; forgiŝta fera bloko /R/; kemia elemento Sn; en maniero de naiva rigardanto; knabo /R/. - **Ĉ.** Ununura /R/; kristana preĝejo /R - neologismo/; levita supra korpomembro; havi en mano; transigi ion. - **D.** Rivera krustulo /R/; kara persono /sen fina o/; vira voĉo; provizi per bataliloj; bezonaĵo de lernanto /R/. - **E.** Mallongigo de bildkarto; havanta koloron de flaveca ĝis ruĝecatero; spica herbo /R/; kapobleka; me tiu; esti aganta; negativa vorteto. - **F.** Specio de bovo; 24 horoj; grupo; nevideble eligi /R/; aerforma materio /R/; rilatanta saltantan amfibion; hejmbesto /R/. - **G.** La dua parto de la eldiro. - **Ĝ.** Rivero en Hispanio; oksigena modifaĵo; unuigo de ŝtatoj; romie 403; subita spasma kaj brua elspiro.



Vertikale: **1.** Rano sekvanta post la unua rano /vica numero kaj R/. - **2.** Antikva hinda lingvo /R/. - **3.** Sufikso por malgrandigo; najlosimila metala peco por kunigado; havanta econ de lirika poemo. - **4.** Numeralo kun tri nuloj; loko kie troviĝas kreskaĵoj kun karnecaj folioj /sen fina o/. - **5.** Azia ŝtato /R/; krustulo. - **6.** Apartenanta al paseroforma birdo; rebobirdo. - **7.** Konforma al ordinara ŝtato; verda loko en dezerto /R/. - **8.** Adjektiva sufikso de la pasiva prezenca participo; remburita longa seĝo. - **9.** Perforte disigi /R/; loĝanto de nia planedo /sen fina o/. - **10.** Unuafoje publike sin prezenti /R/; skandinava dio de milito. - **11.** Ludkarto kun unu punkto; donu reen sur la lokon. - **12.** Mallongigo de Nigria Televisia Societo; fruprintempa floro /R/. - **13.** Vira voĉo /R/; malŝate ridindigadi. - **14.** Parto de animala skeleto /R/; artikulo teksanta reton. - **15.** Partieto interne de pli granda partio; malagrabla nervincita sento /R/. - **16.** Nedifektita korpostato; trile kantanta birdo /R/. - **17.** Unuo de elektra rezistanco; esti malgoĝa. - **18.** Estanta vigla; france "reĝo." - **19.** Pripensi efektiviĝotan aranĝon; esti vaste konata. - **20.** Rivero en Japanio /insulo Honŝu/; speco de boato /R/. - **21.** Muzike signo de komenco de notliniaro

/R/; granda afrika cikonia birdo /R/. - 22. Trinkajo /R/;
hunde bleki; tuŝi per lipoj /R/. - 23. Roma satiristo. - 24.
Oficiala kapvesto.

Helpo: Ĉ. Kirk o/. - Ĝ. Tajo. - 6. Lania. - 10. Toro. - 18.
Roi. 20. Appi. - 23. Juvelaro. - R = radiko de la vorto.

Adolf Staŭra.

Sufiĉas sendi al redakcio la ĝustan tekston de la eldiro,
plej malfrue 14 tagojn post ricevo de tiu ĉi n-ro de Starto.
4 solvintoj ricevos libropremiojn.

Lotumrezultoj de la krucenigo en Starto 6/80

La moto estis: "SE EN KOR' IO SIDAS - VIZAĜO PERFIDAS"
Lotumelektitaj estis jenaj gajnintoj: Karel Štěpánek el Dolní
Čermná, Vladimír Dvořák el Brodek u Přerova, Vojtěch Smíd el
Hradec Králové kaj Josef Vašek el Olomouc. Ĉiuj ricevos belan
libropremion. Nian gratulon!

La redakcio

La moto de krucenigo el STARTO n-ro 1/81 estis :

NE ĈIUJ OLDULOJ ESTAS PLI SAĜAJ, MULTAJ ESTAS NUR PLI SINGAR-
DAJ

Lotumelektitej estis el multaj kiuj sendis bonan rezulton:

Vlesta Bratová -Jablonec, František Bárta-Žlina, J.Filip -
Chropyně, L.Zagral - Olomouc. Ĉiuj ricevos noveldonitan li-
bron MEZE DE EŬROPO.



I F E R ne estas nur mallongigo

Temas pri interesa provo en GDR - dum la
foiro en Leipzig ankaŭ aranĝi sukcesan ren-
kontigon de esperantistoj. La ĉi-jara ekspe-
rimento plene sukcesis. La Internacian Foiran
Esp. Renkontigon en la tagoj 13.-15.3. partoprenis
trideko da esperantistoj el Ĉeĥoslo-
vakio. La programon butigis ankaŭ sesmembra
folkloro grupo el Javoříčko. Ĝiaj muziko,
kantoj kaj dancoj rapide levis bonan ĥumor-
atmosieron kaj varmigis la ĝangon de ĉeĥoj
kaj slovakoj kaj certe ankaŭ de germanoj.
Ĉiuj poste komune kantis internaciajn jam
melodiojn "Marisa, kisu min" ktp. Nu, eble
estontfoje partoprenos ankaŭ vi. Jam nun vi
povas vin aliĝi ĉe Rolf Beau, Jacobstr.9,
7010 L e i p z i g , DDR.



Mi estis aŭdinta, ke jam de longe ĉesis sian agadon iam elstara esperantistino Jana Číhová - Hrdličková.

Si estis ege agema. Laborinte aktive kiel tradukistino dum esperantaj disaŭdigoj de Radio Praha ŝi prenis sur sin eĉ la funkcion de prezidantino de Virina Komisiono de MEM. Ke ŝi faris sian funkcion bonege atestas du kromuloj, kiujn ŝi donacis al nuntempa prezidantino de V.K. de MEM.

En la kolekto de la korespondaĵoj oni povas legi nomojn de mondkonataj virinoj en Esperantista movado ekz.: Ludmila Jevsejeva - poetino el Riga USSR, Julie Šupichová, konata ĉeĥa Esp.instruistino kaj verkistino de multaj lernolibroj, Vilma Eichholz, estrino de Voĉo de Virinoj, Kanado. Ŝi donacis al Jana dum la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto flageton de virina grupo de Kanado "Voĉo de virinoj"; poetino kaj tradukistino Milda Jakubcová, Anna Bárachová, Niilo Kavenius el Finnlando ktp.

Ke eksterlande oni ankoraŭ estimas ŝian entuziasmon, jen poemeto de la pionira grupo el Ziemeri en Latvia SSR, dediĉita al 'onklino Jana' okaze de Internacia Tago de Virinoj:

AŬTORO:

A. J. KUBULNIEKS

Sur sombra fono de arbaro
Vi pincas kiel ~~anta~~ roz',
Kaj banas sin en verda maro.
Sur sombra fono de arbaro
Samkiel en la budoaro,
Vi ridas en alloga poz'.
Sur sombra fono de arbaro
Vi pincas kiel ~~anta~~ roz'.

M. T.

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

Sociologia esploro

Granda, interesa kaj ĉefe utila laboro estis entreprenita dum lastaj semajnoj en nia Asocio. Post antaŭiraj zorgaj preparlaboroj oni alpaŝis al sociologie esploro inter homoj, kiuj estas aŭ estis niaj membroj kaj personoj, kiuj aliĝas en skribajn kursojn.

Tiuj ĉi tri homgrupoj /entute 2.250 personoj/ ricevis demandliston kun vico da demandoj. En dezirita tempolimo revene ni ricevis 1300 respondojn /t.e. plurajn respondojn de unuopaj pridemanditoj/. Ĉiuj respondoj por sumigo kaj pritakso estis transdonitaj al komputilo.

Dum la preparlaboroj de tiu ĉi numero de Starto ni ankoraŭ ne havis la rezultojn de la esplorkonkludo. Sendube tamen jam nun estas la fakto, ke temas pri la unua simila sociologia esplorkonkludo en tuta esperantista movado laŭ amplekso kaj enhavo. Estontece oni povos la rezultojn uzi por orientigo de propaganda taktiko en nia movado. Ni supozas en n-ro 3/81 trovi vin pli proksime informi pri la rezultoj kaj konkludoj.

Kř.

STARTO 81/2

Ni ricevis kelkdekojn da leteroj kaj kartoj, kiuj pozitive pri-
taksas novan liniofinan skribaranton de Starto. Al ĉiuj skri-
bintoj sincere dankon pro la kunlaboro.

La redakcio

Medicinista sekcio de ĈEA kunvenis la 20-an de dec.1980 en
Praha sub gvido de D-ro Hradil, redaktoro de bulteno SANO. Li
informis la ĉeestantaron pri la historio de la sekcio kaj ĝia
ĝisnuna agado kaj pri problemaro ĉirkaŭ eldonado de la bulte-
no Sano. Kelkaj el 11 ĉeestantoj promesis liveri materialon
por publikigo en Sano. Por organiza laboro aliĝis s-ano Pa-
tera, s-anino Zedníková kaj D-rino Bláhová. La lastaj s-aninoj
promesis kompili la liston de abonantoj de la bulteno. Ing.
Pluhař konsilis ĉe specialaj komiaj terminoj. Oni diskutis pri
la 3-a IMEK en Ruse kaj eblo de fotokopia reeldono de la medi-
cina terminaro. Kelkaj ĉeestantoj informis pri gravaj kaj pu-
blikindaj aktivadoj de sia laborkampo kaj promesis sendi ra-
portojn aŭ ĉeflingvajn aŭ esperantajn.

Dr. J. Hr.

Ekzamena fako de ĈEA anonces:

La asociaj ekzamenoj pri la scipovo de Esperanto kaj pri la ka-
pablo instrui Esperanton estos la 1-an de aŭgusto 1981 en Some-
ra Esperanto-tendaro en Lančov, inter dua kaj tria etapoj.

Aligu ĝis 30.5.1981 ĉe Karel Franc, Dukla 2287, 53002 Pardu-
bice. Kiu volas pliperfektigi por koncerna ekzameno dum dua eta-
po en Lančov, aligu senprokraste ĉe Esperanto-klubo en Třebíč.

La deveno de Andreo Ĉseh

Rilate al la artikolo en la pasinta numero mi aldonas la nove
akiritajn faktojn: la avo de A. Ĉseh, Jakub Ĉech, naskiĝis
en Bohdaneč kaj en la j. 1848 elmigris en Transilvanion. Tie
naskiĝis Otto Felix, filo de Jakub kaj la patro de Andreo. La
patrino estis Gabriela de Homaro kaj de Beleneš. Zbraslav en la
artikolo estas tiu apud Velké Meziříčí, ne Z.nad Vltavou!

S-ano E. Borsboom en Nederlando volas verki biografion de A.
Ĉseh kaj tiucele deziras veni ankaŭ en nian landon por tie ser-
ĉi detalojn, precipe en Bohdaneč kaj Telč. La lasta posteulo en
Bohdaneč, Milan Ĉech, elmigris Parizon.

J. Mařík

Somera Esperanto-Tendaro en Lančov estas komplete moderniza-

ta. Mondkonata kaj unika pro siaj tradicio kaj amplekso tendaro
ricevas de nia ŝtato subvencian monsubtenon en alteco de ĉirkaŭ
750000 Kčs. La preskaŭ astronomia sumo /laŭ esper.kalkuloj/hel-
pas radikale ŝanĝi la karakteron de loĝigo kaj de socialaj aran-
goj por jam ĉi-jaraj partoprenantoj. SET plene ŝanĝigas je kaba-
na kolonio kaj vaste sin proponas ek de konvena printempo ĝis
malfrua somero al ĉiuj interesuloj. Dum la jam tradicia tempope-
riodo en la tendaro oni instruos en esp.kursoj /dum t r i duase-
majnaj etapoj/ kaj ekster ili la tendaro servos al rekreaciaj

celoj de interesuloj kaj iliaj familianoj aŭ gekonstatuloj.

Komitato por fremdultrafiko eldonis belegan multkoloran, vere luksan bildlibro-prospekton pri la ĉarma regiono de valdigo Vranov kaj Lančov en rusa, germana kaj Esperanto. En la esp. versio estas ankaŭ informoj pri SET. Interesuloj senkoste ricevos ĝin ĉe Správa rekreačních zařízení 671 03 Vranov nad Dyjí, ĈSSR.

- Pri tiuj ĉi ĝojigaj faktoj, sed ankaŭ pri aliaj demandoj traktis la prezidantara kunsido de ĈEA en sia eksterĉefurba kunsido en novarangita Domo de Teodor Kilian en Třebíč, nuna posedaĵo de loka EG.

- - - - -

Unuigintaj Nescioj eldonis en Esperanto dum 1979 Ĉarton de UN kaj Statuton de la Internacia Kortumo. Nia Asocio ricevis kelkajn ekzemplerojn.

- - - - -

K o r e k t o. En la n-ro 6 de Starto enŝoviĝis grava dat-eraro en la rememoro de F. Kožík pri la Verda stacio. La regula ĉi-monata artprogramo renoviĝis en Radio Praha 1948-01-05 kaj daŭris ĝis 1950-09-06 /do ne ĉesis en 1948!/. La ceteraj elsendoj de Praha /mezaj kaj mallongaj ondoj/ daŭris de 1945-09-17 ĝis 1950-09-17.

- - - - -

J. Mařík, radio-laborinto

PROGRAMO

de la IV-a Turisma Renkontiĝo de Ercmontaraj Esperantistoj
Merklin apud Karlovy Vary, hotelo "Pod lesem", 12. - 17. 06. 1981

Vendredo 12.06.1981: Ĝis la 17-a horo akceptado de la partoprenantoj, organizaĵa sferoj, por interesuloj ekskurso en vilaĝon Oldřich.

Sabato 13.06.1981: Ekskurso al protektata naturo Svatoš-Rokoj:

Grupo A /junulara kaj bonaj turistoj - ĉ. 13 km/

Grupo B /pli maljunaj turistoj kaj promenuloj - ĉ. 7 km/

Dimanĉo 14.06.1981: Ekskurso en Boží Dar /1028 m s. m. n./:

Grupo A /daŭrigota el Torfejo Boží Dar al Horní Blatná - ĉ. 17,5 km/

Grupo B /daŭrigota el Torfejo Boží Dar al la plej alta monto de Ercmontaro Klínovec 1244 m s. m. n. - ĉ. 7,5 km/

Lundo 15.06.1981: Vizito de la mondfama banejurbo Karlovy Vary:

Trarigardo de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Bano en naĝejo de la hotelo Thermal /ne forgesu banĉapon!/

Mardo 16.06.1981: Solena honorigo de la militviktimoj en Ostrov n/O kaj piedekskurso trans Popov ĝis Jáchymov, lulilo de la atom-epoko /ĉ. 13 km/.

Merkredo 17.06.1981: Solena kunveno de ĉiuj partoprenantoj kaj adiaŭo.

Rimarko: Ĉiuvespere kultura programo kun kantado kaj projekciado de la diapozitivaj pri la venontaga programo.

ĈESKĚ BUDEĴOVICE

kaj ĝia kulturdomo estis atestantoj de la festa okazintaĵo. Nia loka grupo tie rememoris sian 75 jaran por la esperantan historion. Pli ol 65 membroj kaj gastoj partoprenis solenan kunvenon de la klubo. La programon pliriĉigis sruprizo, la ensemblo "BARBULOJ", kiu kantis malnovajn kaj novajn kantojn de tenderfajroj kaj ludis sur gitaroj. Ilia 4 persona grupo fakte havis tie sian unuan prezentadon kaj, kiel oni aŭdis, sukcesan. Ŝajnas, ke tiu prezento /okazinta 28.3.1981/ ne estos la lasta.

- kŭz -

KIU DESEGNIS EN STARTO 1/81

Ĉar venis kelke da demandoj, kiu estas aŭtoro de desegnitaj anekdotoj pri Esperanto, ni kun ĝojo /kaj samtempe kun pardonpeto/ volas informi, ke kun nia redakcio afable kaj libervole kunlaboras konata jam desegnisto - humoristo PAVEL RAK, kiu samtempe jam estas longjara nia membro. Li ofte kunlaboras kun nia satira gazeto DIKOBRAZ kaj kun nia televido. Ĉu ni ne trovus pluajn, kiuj volus esti membroj de nia redakcia rondo kaj helpi ĉefe kun tekstoj? Estas necese, ke ili iomete havu talenton por la ĵurnalistiko kaj bonan lingvoscion.



STARTO - neprevidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 00 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Ze obsah tohoto čísla odpovídá PhDr. Jeromír Jermář a Zdenko Krámský. Grafická úprava Milen Labašta, kresby Pavel Rak. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 1.4.1981. Dohledací pošta Praha 07, snížený poplatek za poštovné povolen ředitelství pošť Praha pod č.j. P/1-1267 ze 6.4.1979.

STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1, ĈSSR, aperas sesfoje jere.

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-avolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado au sur submuro au sur ebena tereno


Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (koop. s.r.o.)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, a telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon — kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
— oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro —

KARLOVY VARY - FRANTIŠKOVY LÁZNĚ - MARIÁNSKÉ
LÁZNĚ - JÁCHYMOV - TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY - JANSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ - JESENÍK
LUHAČOVICE - TEPLICE NAD BEČVOU

BALNEA *

Reprezentanto de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj kurac-fontoj,
PAŘÍŽSKÁ TRÁVA 11, 11001 PRAHA 1, ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215